Augustin Wibbelt,

Tia mi volus esti!

tradukita de Manfredo Ratislavo

Serena volus esti mi,
samkiel tiu tag‘,
klarpensa kaj sen emoci‘,
sen iu kontraŭ-ag‘.

Ĝojigas min ĉe l‘ vojo-rand‘
de l‘ floroj la kolor‘.
Sub la ĉiel‘ la varma land‘
abundas da gren-or‘.

Am-riĉa volus esti mi
por ĉiu aliul‘.
Fariĝu, kiel volos Di‘!
Mi estu ĝojemul‘.

Traduko de la Germana poemo “So mögg ick sien!” de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-517-1017 (2012-07-20 20:12:16)

Profesoro d-ro Hans Taubken, estrarano de la societo “Augustin Wibbelt”, afable permesis al mi, Manfred Retzlaff, per retletero de l’ 30.04.2008 la enretigon de miaj tradukoj de poemoj de Augustin Wibbelt. Vidu ankaŭ la retejon de la societo “Augustin Wibbelt”: `http://www.muenster.org/wibbelt/`.